

## Hisado de karpa familio en majo

### Historio

La 5an de majo estas Knaba Tago en Japanio. Estas kutime (tamen ne tiel kutime kiel antaŭe, eble pro malmultiĝo de infanoj) hisi karpan familion por tiu tago. Tiu kutimo devenas de suba ĉina rakonto:

En unu el « La 24 historiaj libroj de Ĉinio » aperas fiŝoj, kiuj provis surgrimpi akvofalon nomitan Dragona Pordo en la torentaĵoj de la Flava Rivero. El ili nur karpino sukcesis en tio kaj fariĝis drako, tiele la karpino trans akvofalo fariĝis simbolo de sukceso en la vivo.

« Karpino » hisita en la 19a jarcento en Japanio estis nur vira karpino nigra. En "Cent Famaj Vidoj de Edo" desegnitaj de Utagaŭa Hiroŝige aperis granda nigra karpino kiel en la apuda bildo. En la 1900-aj jaroj paro de nigra karpino kaj ruĝa karpino aperis kiel patro kaj infano. En la 1950-aj jaroj pli malgranda blua karpino estis aldonita, kaj laŭ tempoŝanĝoj ruĝa karpino estis redifinita kiel patrino, kaj blua karpino kiel infano. Baldaŭ, verda, rozkolora, kaj purpura karpinoj estis inkluditaj kiel karpinoj reprezentantaj gefratojn.



### Karpinoj en mia hejmo

Pasintjare, kiam mi iris al rubaĵkolektejo en mia distrikto, mi trovis maljunulinon kria « Ĉu iu bonvolu ricevi mian karpan familion ! », sed neniu turnis sin al ŝi. Mi jam sendis karpinojn al eksterlandaj esperantistoj, do mi decidis ricevi ĝin, pensante, ke mi povos fari samon denove. Hejme mi malfermis la keston kaj trovis, ke la karpino estas granda. Feliĉe mi havas oportunan balkonon en la dua etaĝo de mia domo por hisi la karpinojn.

Denove venis majo en tiu ĉi jaro. En la lasta jaro mi sentis min malkontenta pri la karpa familio, ĉar la patra karpino ĉiam estis supre de la patrino. Do mi decidis renversi la ordon, metante la patrinojn supren. Mi havis tri kialojn por tio : unue mia gubernio estas fama pro laboremaj patrinoj, due



en februaro la unua ina urbestro naskiĝis en mia urbo, kaj trie mi volis sendi mian kuraĝigan mesaĝon al knabinoj en la baza lernejo, kiu staras antaŭ mia domo.

Mi sendis tiun informon al la urbestro

kaj la lernejestro. La unua ne respondis, sed la lasta tre ĝojis pro tio kaj promesis al mi, ke ŝi nepre parolu pri mia karpa familio al la lernejoj. Estas tre grave montri en ĉiutaga vivo, ke virinoj kaj viroj havas egalan rajton.